3/III.35

La Vendita fianĉino.
Univ. prof. Vl. Helfert.

La freŝaj, per juneca kaj printempa ĉarmoj trateksitaj tonoj de la Vendita Fianĉino de Smetana ekestis en ĝoja tempo, kiam la komponisto kaj ĉiu ĉirkaŭ li travivis la feliĉigan emocion de l'ĉeĥa politika reviviĝo.

La ĉeĥa kultura vivo malfacile ebenigis sian vojon al memstareco k o n t r a ŭ la politika malbonvolo de l'habsburga reĝimo. Necesis energia klopodado, granda anima forto, por ke la popolo rekte staru spite la sistemajn, malamikajn agojn. Precipe sentebla estis tiu ĉi peza premo dum la politika absolutismo de Metternich antaŭ la jaro 1848. Sed ankaŭ tiam, en tempo tiom malĝoja, kreis la ĉeĥa popolo sian romantikan literaturon, sian historiografion kaj la komencojn de sia scienco. La revolucio en la jaro 1848 vekis por mallonga tempo novajn esperojn, nome tial, ĉar ĝi kaŭzis la bankroton de l'absolutismo de Metternich kaj liberigis la katenitajn fortojn de l'ĉeĥa krea spirito. Sed nur por mallonge. Jam en la jaro 1849 ekregis nova absolutismo multe pli prema ol tiu de Mettemich, ĉefe tial, ĉar ĝi estis reĝimo polica, militista. Libera manifestiĝo de l'ĉeĥa spirito estis sufokita. Tiam estis internigita en Brixen-Bressanone la brila ĉeĥa ĵurnalisto Karel Havlíček, kies saĝa kapo estis plena de ideoj pri libereco, al kiu li - suferante en ekzilo - oferis sian sanon kaj vivon. La ĉeĥa publika vivo sufokiĝadis kaj kun ĝi ĉiu libera manifestiĝo de l'arto.

En tiu ĉi tiom malĝoja tempo vivis la plej granda ĉeĥa geniulo Bedřich Smetana en fremda lando: en la sveda urbo Göteborg. Tie li levis la nivelon de l'tiea muzika vivo kaj tie maturiĝis liaj kreaj fortoj. En Göteborg, en fremda urbo, malproksime de sia suferanta patrujo, ekproksimiĝas Smetana al sia propra stilo, al sia akre difinita muzika individueco. Tie li kre-akiris sian orkestran stilon, tie li fariĝis majstro.

Tiu ĉi epoko de lia vivo koincidas kun la bankroto de l' prema habsburga absolutismo en la jaroj 1860 kaj 61. La aŭstra monarĥio, al kiu apartenis ankaŭ la nuna Ĉeĥoslovakio, ŝanĝiĝis en regnon konstitucian. Tiam, en la suno de l'politikaj liberecoj ekfloris nova ĉeĥa vivo kultura. Montriĝis, kiom da kreikapablaj ĉeĥaj fortoj estis puninde kaj perfide malhelpataj de l'malamika politika reĝimo. La kultura Bohemio travivis tiam epokon de ĝoja printempo, de ĝoja ekflugo, kiam la junaj generacioj - la verkista, politika kaj scienca - ĝojkuraĝe eklaboras sur la kampo de l' moderna ĉeĥa kulturo; nova vivo ekpulsis en la vejnoj de l'ĉeĥa popola organismo.

Kaj en tiun ĉi popolan printempon venis Bedřich Smetana. En Göteborg li vigle sekvis ĉion, kio okazis en lia patrujo. Kaj kiam li konsciiĝis pri la nova vivo de l'popola kulturo, neniu forto povis lin reteni. Li forlasis bonan vivo-postenon en Göteborg kaj revenis, en sia idealismo forte kredante je sia kultura destino, al Praha tiucele, por servigi sian genion al la popola kulturo. Li revenas en sian patrujon 37-jara, en sia plej bela aĝo, kiam liaj krei-fortoj estis kapablaj sorĝ-krei majstroverkojn kun la ununura intenco kaj deziro, doni al sia popolo modernan ĉeĥan muzikon, sed antaŭ ĉio ĉeĥan operon.

Jen la fonto, el kiu ĉerpis la Vendita fianĉino sian vivosukon. Ĝi ne estis l' unua opero de Smetana. Antaŭ ĝi li skribis la historian operon Braniboři v Čechách (La Brandenburganoj en Bohemio), en kiu li provis realigi tragikan operan stilon, kiun li rigardis sia plej alta celo. La Vendita fianĉino estas en la verkado de Smetana kvazaŭa ripozo, genia intermezzo, kiun la majstro kreis inter verkoj postulantaj grandan krean streĉon, nome inter la Brandenburganoj kaj la tragika opero Dalibor. Ĝi estas ripozo-paŭzo, en kiu plenigis lian bruston ĝojiga espero, la sama espero, kiu trapenetris la tiaman ĉeĥan kulturan vivon. Smetana skribis tiun ĉi genian ŝercan operon en sia 39-a ĝis 40-a jaro. Mi ne enuigos vin per priskribo de l'ŝanĝoj, kiujn trapasis tiu ĉi verko de sia komenco, kiam ĝi estis ankoraŭ duakta kun parolata prozo, ĝis la nuna formo de triakta tutvespera opero kun recitativoj. Necesas diri, ke Smetana konstante pliperfektigis sian verkon ĝis ĝia definitiva formo, en kiu nun konas ĝin la tuta mondo. La unua prezentado de la Vendita fianĉino okazis la 30-an de majo en la jaro 1866. Kvankam ĝi estis antaŭ la milito de Prusujo kontraŭ Aŭstrio, do en tempo de forta politika ekscito, tamen la opero tuj enradikiĝis en la publiko. Kaj de tiu tempo apartenas la

Vendita fianĉino al la plej popularaj verkoj de l'monda repertuaro. En sia hejmlando ĝi fariĝis vere popola. Sole sur la scenejo de la Nacia Teatro en Praha ni solenis la 30-an de majo 1927 la jubileon de ĝia mila prezentado. Krom tio ĝi estas prezentata kiel plej populara verko en ĉiuj ceteraj teatroj de l' republiko, nome en Brno, Bratislava, Olomouc, Moravská Ostrava, Plzeň kaj aliaj.

Pri malmulte da verkoj oni povas aserti, ke ili respeguligas en tiel alta grado la propran esencon de l'popola animo kiel pri la Vendita fianĉino. Ĉiujn ĝiajn melodiojn kantas la popolo kvazaŭ mem, tiel ili iras el koro en koron. Tamen Smetana nenie uzis popol-kantojn! Ĉio en tiu ĉi verko estas vere kaj entute lia propra inspiraĵo. Sed pro tio, ke li profundiĝis en la popolon por aŭskulti ĝian animon, ke li kreskis kun la popolo kaj sentis kun ĝi, kaj nature pro tio, ke li havis en si la genian forton, kiu kapablas enkorpigi tiujn ĉi subkonsciajn voĉojn en artverko, pro tio ekiĝis lia verko samtempe verko de l'tuta popolo.

Sed ankaŭ la eksterlando ĉiam pli kaj pli ŝatas tiun ĉi verkon. Nuntempe ĝi penetras en la tutan mondon kaj estas ĉie akceptata kiel verko, kiu signifas ĉiam bonvenan pliriĉigon. En tempo, kiam la mondon minacas la ĥaoso, kaŭzita pro reciproka malfido, kiam ŝiriĝas la ligiloj inter homo kaj homo, inter popolo kaj popolo, kiam la idealo de l'frateco inter homoj kaj popoloj ŝajnas fuĝi antaŭ la kruda realeco, en tempo plena de suspekto, malfido, pesimismo, sekretaj rigardoj kaj ankoraŭ pli sekretaj pasioj — en tia tempo sonas Vendita fianĉino kiel promeso el alia mondo. La sorĉa muziko, ĉiam freŝa kaj vigla, la ritmoj, la melodio — tio ĉio ŝprucas el koro, kiu kredis je la homaj boneco kaj amo, kiu kredis je pli bona estonteco ne nur de sia propra popolo, sed de la tuta homaro. Tial estas tiu ĉi muziko tiel ĝoja kaj optimisma. Per tiu ĉi optimismo faras la Vendita fianĉino servojn de amo kaj kompato en la nuna tempo. Ĝi estas fonto de nova forto kaj espero al tiuj, kiuj en la nuna tempo sopiras je varmiga, ĝojiga, akceliga kaj esperiga vorto. Ĝi estas unu el tiuj grandaj brilantaj steloj, kiuj promesas al la homaro sanktan harmonion: estontecon de paco, fido kaj amo inter homoj.

Trad. Th. Kilian.
Třebíč, 31-3-35